



Esperanto 80

Okdek-anoj Ĉe l' Papero

Nova eldono 2004 • n-ro 7a

La gazeto de la membroj de l' asocio Esperanto 80

Majo — Mai 2004

Le journal des membres de l'association Esperanto 80

Réunion conviviale!
Gasta kunveno!

Réunion conviviale – Gasta kunveno

N'oubliez pas de venir à la réunion conviviale qui aura lieu :

le Vendredi 7 mai 2004 dès 18h30, salle des Tilleuls à Salouël (derrière la Mairie).

Surtout pensez bien, si vous souhaitez participer au repas qui aura lieu ce soir-là, de téléphoner à Daniel au 03 22 47 30 11 **avant le mercredi 5 mai 2004 au soir**. Cette fois-ci, le cœur de la discussion tournera autour des derniers préparatifs de la manifestation européenne de l'«Eŭropa Bunto» qui aura lieu deux jours plus tard.

Un numéro plein d'infos Informplena numero

Kiam vi recevovos tiun ĉi ĵurnalon, ni estos strebontaj al la lastaj preparoj, por la manifestacio de l' «Eŭropa Bunto» okazonta en Strasburgo dimanĉon la 9an de Majo.

Jean-Claude per sia teksto *Mia restado en KVINPETALO lastan semajnon de februaro 2004* rakontos al vi la staĝon pri tradukado, kiun li trapasis en Bouresse strebante al trapasado de la ekzameno «Kapableco» (jam Jean-Claude dum aprila gasta kunveno prelegis pri tio. Tiu teksto interesos tiujn, kiuj ne ĉeestis tiun kunvenon).

Danielo, al ni parolos pri la enspezojn kaj rentojn de UEA. Li tion ilustris per artikolo verkita de Renato Corsetti, la nuna prezidanto de UEA kaj estrarano de Instituto Hodler'68.

Post kelkaj novaĵoj kaj leg-konsiloj ĉe la kvara paĝo, malkovru en la legiga suplemento de la gazeto, portreton de unu el la plej gravaj aŭtoroj pri originala literaturo en Esperanto: Julio Baghy. Ĝi estas la unua portreto el sinsekvo, kies celo estas vin klerigi pri la riĉeco de la internacia Kulturo propra al Esperanto. Tio estas ankaŭ okazo respondi al Luc Ferry, eksministro pri edukado de la antaŭa franca registaro, tiel nomata «Raffarin la 2a», kiu antaŭ nelonge deklaris Esperanton, *lingvo senkultura*. Antaŭjuĝo-plenaj paroloj, kiuj atestas pri lia nesciado pri efektivecoj de la lingvo internacia.

Lorsque vous recevrez ce journal, nous serons dans la dernière ligne droite des préparatifs pour manif de l'«Eŭropa Bunto», qui aura lieu à Strasbourg le 9 mai.

Jean-Claude à travers son *Mia restado en KVINPETALO lastan semajnon de februaro 2004*, nous racontera le stage de traduction qu'il a passé à Bouresse en préparation du «Kapableco» (pour ceux qui n'étaient pas là lors de la réunion d'Avril, il nous a présenté ce texte sous la forme d'un exposé lu).

Daniel nous parle des sources de revenus d'UEA, l'Association Universelle d'Espéranto avec en illustration un article de Renato Corsetti, l'actuel président de l'association et membre du comité directeur de L'institut Hodler'68.

Après quelques nouvelles et conseils de lecture en quatrième de couverture, découvrez, dans la supplément lecture, le portrait d'un des plus grands auteurs de littérature originale en espéranto: Julio Baghy. C'est le premier portrait d'une série dont le but est de vous éclairer sur la richesse de la Culture internationale propre à l'espéranto. C'est aussi un peu une réponse à Luc Ferry, ex-ministre de l'éducation du gouvernement *Raffarin II*, qui a déclaré il y a peu, l'espéranto *langue sans Culture*. Paroles pleines de préjugés qui témoignent de son ignorance sur les réalités de la langue.



Cyrille

✦ Julio Baghy mezaĝa kaj lia subskribo

Cyrille

Mia restado en KVINPETALO lastan semajnon de februaro 2004



Jean-Claude dum 2003 ĉe l' marbordo...

Kial mi veturis al Kvinpetalo ?

Kvinpetalo estas unu el la plej famaj Esperanto centroj. Ĝi akceptas seminariojn tre diversajn kaj ankaŭ kompreneble preparadojn al ekzamenoj de UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto) kaj SAT (Senacieca Asocio Tutmonda). La Kvinpetalanoj ankaŭ gvidas perkorespondajn kursojn kaj antaŭ preskaŭ unu jaro mi decidis aliĝi al tia perkoresponda kurso por prepari la triagradan kurson t.e. la kapablecon.

La unua nivelo de la francaj ekzamenoj nomiĝas «Atesto pri lernado», la dua-grada nomiĝas «Atesto pri praktika lernado» kaj la tria do «Kapableco». Se oni sukcesas trapasinte tiun gradon, tio signifas ke oni kapablas prelegi en Esperanto aŭ turismumi kaj interpreti aŭ instrui la lingvon.

Kvinpetalo gvidas kursojn nur por unu parto de tiu ampleksa programo de kapableco, nome por tradukoj, historio de la movado kaj disertacioj. Lastaje mi diligente faris miajn taskojn, sendis ilin, ricevis korektojn kaj do mi aliĝis al tiu triagrada kurso, kiu daŭris kvin tagojn. Kvinpetalo situas en la eta vilaĝo Bourresse, ne malproksime de Poitiers, do meze de la pikta regiono.

Mi alvenis iom malfrue en tiu vilaĝon, je la sepa kaj duono, jam noktis kaj mi devis serĉi en ĉiuj stratetoj de la vilaĝo por finfine trovi tiun centron dank' al... angliano!!!

En tiu vilaĝo estas mirige ke nenia ŝildo aŭ panelo indikas la ĝustan vojon aŭ direkton por atingi tiun faman centron.

Kiel aspektas tiu centro ?

Ĝi aspektas tute ne kiel la kastelo Grezillon ekzemple. Kvinpetalo ne estas granda konstruaĵo sed domaro, aro de

ŝtonaj domoj ĉirkaŭtaj de aliaj vilaĝaj domoj ĉiuj preskaŭ la samaj. La ĉefa domo de Kvinpetalo estas la hejmo de Suzanne Bourot nia gastigantino, la kunulino de Georges Lagrange, tiu eminenta Esperantisto kaj verkisto. Tiu domo estas la loko kie oni ariĝas por manĝi, diskuti ĉiuj kune. Kiam venas le tempo por paŭzi, aŭdeblas tintileto kiu vokas nin. Iompostioje Kvinpetalo kreigiĝis kaj instaligiĝis arigante la plej proksimajn domojn al la ĉefa domo. La aliaj domoj estas uzataj por kursoj, bibliotekoj kaj kompreneble por akcepti familiojn kaj unuopulojn. En Kvinpetalo etendiĝas korteto kie oni povas eksidi kaj ripozi, legi, diskuti sub la freŝa suno de februaro. La aliajn domojn oni atingas preterpasante legomajn aŭ florajn ĝardenetojn. Pli ol nur la domo de Suzanne kaj Georges, Kvinpetalo estas la domaro de katoj kaj belegaj birdoj kiel ekzemple bluaj kaj nigraj paruoj, kardinaloj, najtingaloj kotopoj...

Suzanne instalas antaŭ la domo brdajn manĝujojn kaj multaj birdoj multkoloraj envenas por nutri sin. Ŝajnas ke birdoj kaj katoj tre bone kunvivas. Estas kvazaŭ miraklo. Mi neniam vidis katon kapti birdon.

Kio pri la triagrada kurso ?

Entute dek kvar personoj partoprenis inkluzive du junuloj Flora kaj Samir denaskaj dekkvaraĝaj Esperanto parolantoj.

Temis do pri tradukado de literaturajoj al kaj de Esperanto. La unuan matenon de nia semajno, Christian Lavarenne, la anstataŭinto de Georges, klarigis al ni kiuj estas la reguloj de la tradukarto por la franca kaj por Esperanto. Kaj tuj post la unua tagmanĝo, li disdonis la unuajn tradukendajn taskojn kaj ni komencis traduki unuope de la dua ĝis la paŭzo posttagmeze. Post la paŭzo, ĉiu proponis sian propran tradukon kaj Christian vere gvidis la kurson kaj ni serĉis kune en la diversaj vortaroj por trovi kune la plej ĝustan dirmanieron kaj esprimon. Tamen, kiel klarigis Christian, ofte ne ekzistas nur unu ĝusta

traduko sed pluraj, ĉefe en Esperanto. Alia grava parto de la programo al la kapableco konsistas el ampleksa kono de la Esperanta historio kaj movado. Rilate al tio ni aŭskultis du prelegojn: — unu prelego pri «La Esperantista laborista movado ĝis la dua mondmilito» fare de Anne-Sophie Markov, la patrino de Flora, instruistino pri historio en liceo, kaj kiu verkis memuaron pri tiu temo.

— dua prelego pri «la unuaj gazetoj de la movado ĝis la dudekaj jaroj» fare de Thérèse Pinet.

Do nun kio pri la etoso, la spirito kaj eĉ la animo en Kvinpetalo...

Kiel mi travivis tiun semajnon ?

La etoso en Kvinpetalo estas tre agrabla, tre familia kaj korvarmiga. En la plej granda ĉambro de la ĉefa domo brulas karpenaj bonodoraj ŝtipoj en la kameno. Suzanne kaj Thérèse, la kuiristino, estas kiel diri, la avinoj de la loko, kiuj zorgas pri la organizo. Kelkaj gastoj kunportis siajn proprajn kuirajojn, kukojn, konfitaĵojn ktp. Paro de anglaj Esperantistoj kiuj loĝas ne for de Kvinpetalo venas por helpi. Aliaj amikoj ĉeestis dum tiu semajno por helpi. Ankaŭ mi helpis iomete por viŝi telerojn aŭ glasojn kaj ordigi la ĉefan ĉambron. Kiel en Morbecque, por la norda rendezuo, mi konatiĝis kun tre afablaj kaj tre interesaj personoj. Mi opinias ke estas la plej grava trajto de la Esperanto movado, havi tiun eblecon renkonti tiajn klerajn kaj samtempe tre simplajn personojn, kun kiuj oni enamikiĝas tre rapide kaj tre profunde. Per tiu staĝo mi refoje konsciis pri tiu grava fakto.

Konklude, Esperanto estas la plej trafa ilo por interkonatiĝi kaj interfratiĝi inter tre diversaj homoj, kaj mi instigas vin, karaj geamikoj de Esperanto 80, partopreni t aranĝojn en la Esperanto medio.

Jean-Claude Roy,
prezidanto de Esperanto 80

De kie venas la mono de UEA ?

Ĉu vi povas nur imagi kiel estas la budĝeton de nia internacia asocio? Ne! Eble inter ni, nur Marcel Colleu nia Honora Prezidanto, Raymond Bore nia dumviva membro kaj fame konata esperantisto, aŭ Jean-Claude nia nuna Prezidanto havas ideon pri tio. Mi, kasisto, ne! Mi nur scias ke mono venas de:
— vendado de libroj, kasedoj, videobendoj k. t. p. Notinde, dum la ĉiujara internacia kongreso, kaj dum diversaj esperantaj aranĝoj kaj rekte de la Centra Oficejo,
— kotizoj (naciaj asocioj, fakaj asocioj aŭ individuaj membroj) ĉiam tro altaj sed

de multe ne sufiĉaj,
— kaj... DONACOJ!!!

La sistemo adoptita de UEA estas ke la donacoj fariĝas kapitalo. Nur la rentumoj produktitaj de la ŝparlokita kapitalo estas uzita, uzata, uzota por subvencii agadojn favore al la disvolvado de Esperanto: estas la Institucio Hodler'68.

En la ĝangalo de la komunikegado inter la esperantistoj venis, ĝis mi!, la eĥo ke kelkaj deziras uzi almenaŭ parton de la jama kapitalo por tuj ampleksi... Kion? La fina venkon?

Ĉu la ombro de nova skismo en la movado? Ĉu oni devas gardi la potencon de la kapitalo kaj kreskigi ĝin? Ĉu estas veninta la favora momento riski parton de la kapitalo por sukcesi loĝigi Esperanton en superan situacion en la monda sceno?

Ĉi sube vi trovos artikolon eltirata de la oficiala revuo *Esperanto* de Aprilo 2004 verkita de Renato Corsetti mem, la nuna Prezidanto de UEA.

Daniel Devis,
kasisto de Esperanto 80

Institucio Hodler'68: formikoj kun ŝtalŝranko

Ni ĉiuj en la okcidenta mondo konas la fablon pri la formiko kaj la cikado. Cikado estas la simbolo de senpensa gajulo, kiu tre ĝoje vivas sian vivon dum la somero kaj ne pensas pri la venanta vintro, dum formiko laboras tre intense dum la tuta somero por havi rezervon por la vintro.

Intertempe oni produktis ankaŭ versiojn de tiu fablo, en kiu la fino estas inversigita, ĉar en la decida momento cikado partoprenas registaran programon por senlaboruloj, dum formiko devas pagi eksterordinaran imposton, k. t. p. Sed tiuj versioj estas versioj de kontraŭuloj de registaraj programoj por senlaboruloj, kaj ni povas preteratenti ilin. La vero kuŝas en la originala versio, kiu estas konata ankaŭ ekster la okcidenta mondo per proverboj, kiuj ĉie asertas, ke se vi volas, ke la dio (de kiu ajn religio) helpu vin, vi devas ankaŭ helpi vin mem.

Tion komprenis kelkaj tiamaj aktivuloj de UEA en la 60-aj jaroj, kiuj fondis la Institucion Hodler'68, kies celo estis kaj plu estas kolekti kapitalon por financi per la rento agadojn ĉefe de UEA mem sed ankaŭ de aliaj instancoj de la Esperanto movado.

La historio de IH'68 estas longa kaj mi ne volas rakonti ĝin. Sed en unu frazo mi povas diri, ke IH'68 de tiam funkciis

kiel ŝtalŝranko de UEA.

Membroj malavare subvenciiis ĝin per donacoj, pruntoj kaj heredaĵoj, kaj IH'68 laŭ sia statuto investis ĉion en nemov-eblaĵoj (financaj kaj domaj), kiuj ankoraŭ estas kun ni kaj ankoraŭ per siaj fruktoj permesas al IH'68 helpi la movadon post 35 jaroj.

Kiam IH estis fondita, la mondo estis esence alia. Ne ekzistis komputiloj nek poŝtelefonoj kaj la tuta labormaniero estis esence pasintjarcenta.

Tamen, danke al la saĝaj decidoj de la tiamaj fondintoj, IH estas ankoraŭ aktiva. La statuto de IH'68 fakte estas tre rigora kaj ne permesas eĉ al la plej fantaziaj estraranoj (eble la cikadoj de la fablo) foruzi la kapitalon por laŭmodaj furoraĵoj, promesantaj la finan venkon por morgaŭ maksimume en la posttagmezo. Tiu eco de IH estas bona, se oni pensas, ke ni estas movado, kiu ankoraŭ dum iom da tempo devas pluagadi por «atingi la celon en gloro», kaj tiu pluagado normale signifas «pluelspezadon».

La estraro de UEA, kiu nomumas la estraron de IH, ĵus renovigis tiun estraron, en kiu nun troviĝas la tre juneca Gregoire Maertens, kiu stampis la historion de IH, kaj de la tuta movado, dum jardekoj, kaj la tre mature serioza

Ilja De Coster, estrarano de TEJO, ĝis la lasta tempo. Al ili aldoniĝas, kiel help-formiketoj, mi mem kaj Ans Bakker-ten Hagen.

Kiel vi vidas, temas pri bela miksaĵo de ĉiuj tendencoj en la movado. Ĉi tiu nova estraro jam kunvenis kaj jam aljuĝis subvenciojn. Nun ĝi intencas relanĉi la tutan agadon de IH, konservante ĝian esencan trajton: IH estas ŝtalŝranko por la Esperanto-movado. Esperantistoj devas scii, ke la sumoj donacataj al ĝi restas sekuraj kaj produktas siajn efikojn dum longa tempo.

Estraranoj de movadaj instancoj venas kaj foriras. Oficistoj venas kaj foriras, sed IH restas tie kaj daŭre serĉas indajn agadojn por Esperanto, kiujn ĝi subtenu.

Ĉar tute ne estas antaŭvideble, ke en la tria jarmilo oni ne plu bezonos monon por agadi por Esperanto, vi povas fidi, ke IH estos ankoraŭ bezonata.

Se vi interesiĝas kiel helpi la movadon finance pere de IH (per donacoj, senrentaj kaj kunrentaj pruntoj aŭ heredaĵoj), bonvolu skribi al ĝia estraro ĉe la adreso de la Centra Oficejo de UEA.

Renato Corsetti,
prezidanto de UEA

Des sites, des sites, rien que des sites...

Pour votre information voici quelques adresses de sites internet qui, je l'espère vous aiderons à vous enrichir tant sur la langue espéranto que sur les réalités des langues, par exemple dans le cadre de l'Europe.

Les deux premiers sites que je vous propose sont des sites qui mettent l'accent sur la diffusion d'informations sonores et de communication en espéranto.



L'Esperanto Radio Arkivo est, comme son nom l'indique, une archive des émissions de radio en espéranto (ensemble très hétéroclite: radio Chine internationale, radio libertaire, radio cuba, radio Vatican, etc.).

Vous y trouverez regroupés sous forme de fichiers mp3, des émissions radio récentes du monde entier, émises en partie ou en totalité en espéranto. Ces fichiers peuvent être téléchargés facilement, bien qu'assez lourds (connexion rapide recommandée), puis convertis en fichiers gravables sur CD et être passés sur chaîne haute-fidélité.

<http://radioarkivo.org>

Le second site, de la même trempe que le premier regroupe les adresses des sites web des radios en espéranto, des sons pour apprendre l'espéranto et des sites de « clavardage » (mot québécois signifiant *T'chat* en français métropolitain).

<http://eoo.8k.com/radioj.htm>

Le troisième site, est le site personnel d'un médecin suédois dénommé Hans Malv. Il ne s'agit pas d'un site personnel ordinaire du style: *Moi, Mon chat, Ma femme, Mon voyage à Pétaouchnoque, avec renfort d'images...*

C'est une site très strict: rien que du texte... Mais quel texte! En 15 langues! Titré «Un monde où tout le monde se comprend est un monde meilleur», il nous parle de la confusion linguistique qui règne dans l'Union européenne, les Nations Unies et le monde, de l'importance de nous mettre d'accord sur la langue à utiliser pour la communication internationale ainsi que de la nécessité de conserver et protéger nos langues.

La page d'accueil en français:

<http://www.2-2.se/fr/index.html>

À lire plus particulièrement: *Pourquoi la langue maternelle est-elle importante?*

<http://www.2-2.se/fr/11.html>

Et, *La langue, une question de sûreté*

<http://www.2-2.se/fr/16.html>

Cyrille

Kion legi en Esperanto?

Literaturo en Esperanto (originala)

Tiu ĉi TTT-ejo enhavas multnombrajn ligojn al interretaj paĝoj pri literaturo en Esperanto. La paĝoj estas aranĝitaj laŭ nomo de verkisto. Koloroj informas ĉu temas pri poemo, novelo, romano, teatraĵo aŭ eseo.

<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/literaturo.html>

Baza legolisto de la originala Esperanto-literaturo

Regule legemuloj petas informojn pri legindaj kaj legendaj libroj. Ili certe ĝojos ekscii, ke ekzistas iu «Baza legolisto de la originala Esperanto-literaturo», verkita de la fama William Auld. Li tie rekomendas, kiujn librojn legi.

Tiu listo estas konsultebla je la adreso:

<http://www.esperanto.be/fel/but/baza.html>

Libroj por komencantoj: Informoj

Ĉi tie estas prezento de libroj (papera versio) por komencantoj. Estas informoj pri kiel aĉeti ilin. Kelkaj estas en reto kaj la TTT-ejestro metis ligon al ili.

<http://www.lujz.org/libro/node3.html>

Daniel kaj Cyrille

Proposition de correspondance

J'ai eu une proposition de la part d'une correspondante Russe de la république des «Tchouvaches».

La république, russe depuis le XVI^{ème} siècle mais autonome depuis 1925, se trouve à mi-distance entre la capitale fédérale russe, Moscou, et les montagnes de l'Oural.

La capitale de la république, «Tchéboksary» (environ 400 000 habitants) s'étend sur les bords de la Volga.

JoMo, dont il a été question lors du pré-

cédent numéro d'*Okadekanoj ĉe l'Pape-ro*, a composé une chanson au sujet de la ville et de ses habitants (à découvrir dans l'album «JoMo kaj Liberecenoj»). La population de la république est d'origine incertaine (huns ou Finnois), par contre la langue Tchouvache est sans conteste d'origine turque.

Alina Vasiljeva est étudiante en langues (anglais et allemand) et enseigne l'espéranto à d'autres étudiantes, débutantes. Voici sa proposition:

Cyrille, mi havas proponon. Mi gvidas E-kurson por komencantoj (miaj lernantoj estas studentinoj de 18 ĝis 22) kaj ili ŝatus korespondi kun francaj samideanoj. Kiel vi pensas, ĉu al Okdekanaj plaĉos tia ideo? Ĝis relego, Alina

Si vous souhaitez correspondre avec une de ces étudiantes contactez-moi ou contactez Alina directement par le biais de son adresse de courriel:

heta@rambler.ru

Cyrille



Pri Julio Baghy



Lia vivo

Julio Baghy⁽¹⁾ naskiĝis la 13an de januaro 1891 en Szeged⁽²⁾ en Hungario. Lia patro estis drama aktoro

kaj la patrino teatra sufloristino. Li estis fame konata kiel Esperanto-instruisto, eminenta verkisto, beletristo kaj akademiano. Jam dum sia junaĝo, li estis verkanto kaj multaj liaj poemoj kaj noveloj hungarlingvaj aperis en hungaraj gazetoj. Post liaj lernejoj studoj li fariĝis aktoro kaj reĝisoro de diversaj teatroj.

En 1911, li konatiĝis kun Esperanto, kaj ĝia «interna ideo» tuj forlogis lin. Jen vortoj verkita de li en 1930, aperintaj en la revuo «Hungara Heroldo». Ili atestas kiam, kial kaj kiel li eklernis Esperanton:

«Kiam, kial, kiel mi lernis Esperanton? En 1907 mi konatiĝis kun la nomo. Neniu povis doni informojn pri ĝi. En 1909 mi vidis gramatikon en montra fenestro. Estante nenihava studento mi ofte staradis antaŭ la librovendejo. Scivolemo incitis min. Al mi ŝajnis misteraĵo la artefarita lingvo internacia. Sparinte la necesan sumeton mi aĉetis la gramatikon, kiu kontentigis mian scivolemon por unu-du horoj kaj poste mi forgesis la tutan aferon. Ne seniluziigo — mi ja ne estis, ne estas lingvisto por malice kritiki — sed la zorgoj por la estonteco okupis min pli ol io ajn.

Foje en vagonaro mi renkontis italon kaj tiutempe la beleco de la itala lingvo ravis min. Mi lernis kelkajn lecionojn kaj por kontroli mian modestan scion, mi komencis konversacion kun la fremdulo. Je ĝenerala ĝojo de la kunvojaĝantoj ni parolis per mimiko, gestoj, landkarto, fianĉa ringo, kaj fine mi komprenis, ke la italo estas franca ĵurnalisto, parolanta Esperanton.

Mia intereso revekiĝis. La forgesitan gramatikon mi elserĉis el fundo de iu kesto mia. La «kiam» okazis do en 1911.

En la retrovita libro nur kelkaj paĝoj estis tranĉitaj por legado. Kun surprizo mi rimarkis la hungarlingvajn artikolojn ĉe ĝia fino. Mi konatiĝis kun la ideo kaj celo de la lingvo. Tute sincere, nur ili kaptis kaj katenis min neforviŝeble al la lingvo kaj movado. La nedifinebla interna ideo faris miraklon: verkiston el lingva sentalentulo. Jen la «kial?». Kaj «kiel?».

Aŭtodidakte, poste instruante mi lernis kaj lernas eĉ hodiaŭ kun sincera respekto al la lingvo, kies beleco ne estas malpli valora kaj evolu-kapabla, ol tiu de iu ajn nacia lingvo. Kun respekto al la lingvo kaj amo al la ideo mi restos fidela lernanto ĝia.»

La milito rompis lian profesion karieron kaj ses jarojn li devis pasigi for de sia patrujo en rusa militkaptiteco. Lia ampleksa E-agado komenciĝis en siberia militkaptitejo, kie li gvidis multajn kursojn por diversnacianoj.

Alveninte al Hungario post ta milito, li sin fordonis preskaŭ tute al la lingvo kaj fariĝis unu el la ĉefaj gvidantoj de la hungaria kaj internacia E-movado.

En la lastaj jaroj li, kiel Cseh⁽³⁾-metoda instruisto, gvidis kursojn en multaj landoj ekzemple en Estonio, Latvio, Nederlando, Francio, ktp. Li fondis klubojn, gvidis E-Rondon Amikan, aranĝojn de literaturaj vesperoj, kaj ankaŭ, kiel reiro al liaj radikoj, aktorin kaj reĝisorin la kongresajn teatraĵojn dum pluraj Universalaj Kongresoj.

Baghy agadis multe por plialtigi la spiritan nivelon de la Esperantistaro. Tion celis lia iniciato laŭ kiu la naskiĝtago de Zamenhof (la 15a de decembro), fariĝu la tago de Esperanta libro.

Dum pluraj jaroj li estis ĉefa kunredaktoro kaj ĉefa kunlaboranto de «Literatura Mondo» (ĝis 1933), kunlaboranto en la ĉefaj Esperanto-organoj, kaj fine inter 1961–1967 en «Hungara Vivo». Li mortis en 1967. Multaj el liaj kreaĵoj aperis en tradukoj al naciaj lingvoj.

Liaj arto kaj inspiroj

Zamenhof kaj la antaŭmilitaj E-poetoj estis baritaj de la lingvo, kiu donis malmulte da eblecoj⁽⁴⁾. Mem Zamenhof povis forgesigi la neperfektecon de la poezia lingvo, almenaŭ plejparte per sia sincera, nobla, arda sento, kiu kreskis super la formajojn⁽⁵⁾. Sed krom la eksperimentoj de Grabowski, neniu poeto volis, aŭ povis elperforti sin el la frua tradiciemo de la juna Esperanta poezio. Baghy fariĝis, post la mondmilita apatio, la unua poeto, kiu povis poeziumi tute libere kaj flue, superinte la malfacilaĵojn, altrudatajn de la lingvo.

Baghy estis emocie lirika interpretanto de tiu fundamenta homeco, kiu estas la komuna bazo de la internaci-lingva kolektivo. Pro tio li estas unu el la plej «esperantistaj» poetoj, kiun neesperantistoj povas nur malfacile kompreni⁽⁶⁾. Liaj poemoj estas melodiecaj kaj abundas je formoj propraj al Esperanto. La materialo por liaj verkoj venas el liaj spertoj dum la siberia militkaptiteco kiu rezultis de la unua mondmilito⁽⁷⁾.

Kálmán Kalocsay, eminenta esperantisto inter esperantistoj, verkis poemon pri li:

*Julio Baghy, homo homa
Homecon serĉas malespere
Kaj luktas arde kaj kolere
Kun la milito sango-voma*

*En nokto de Malam' fantoma
La koron portas li fajrere
Julio Baghy, homo homa
Homecon serĉas malespere*

*Pri ĉio misa, falsa, gnoma
Indignas li profet-severe
Sed ofte ridas ni sincere
Se ĉarmas nin per ŝerc' aroma*

Julio Baghy, homo homa.

Ferenc Szilágyi pri Baghy diris en 1934 en la Enciklopedio de Esperanto:

«Liajn verkojn karakterizas la tendenco, kiun esprimas lia devizo: «*Amo kreas pacon, Paco konservas homecon, Homeco estas plej alta idealismo.*» Liaj unuaj poemoj venis el rusa militkaptiteco; ili kaŭzis surprizon kaj ĝojon.»

Liaj verkoj

Julio Baghy estis tre fekunda verkisto. Jen la listo de liaj verkoj.

Preter la vivo (poemoj, 1922), **Viktimoj** (romano pri lia siberia militkaptiteco, 1925), **Pilgrimo** (poemoj, 1926), **Dancu marionetoj!** (noveloj, 1927), **Migranta plumo** (noveloj kaj poemoj, 1929), **Hura!** (satira romano, 1930), **Printempo en la aŭtuno** (romano, 1931), **La vagabondo kantas** (poemoj, 1933 kaj 1937), **Verdaj donkiĥotoj** (romano, 1933), **Sur sanga tero** (dua romano pri lia siberia militkaptiteco, 1933), **La teatra korbo** (noveloj, 1934), **La verda koro**⁽⁸⁾ (romaneto por komencantoj, 1937), **Sonĝe sub pomarbo** (lirika dramo, 1958), **Koloroj** (noveloj, 1960), **Ĉielarko** (versa reverko de fabeloj de 12 popoloj 1966).

Postmorte estis publikita: **Aŭtunaj folioj** (poemaro, 1970), **En maskobalo** (teatro, 5 unuaktaĵoj, 1977).

Tiun ĉi ampleksan kaj en ĉiuj detaloj

gravan verkadon kompletigas la amuzaj kurskajeroj **Nik Nek** (1928) kaj **Kaj Jen** (1946).

Cyrille

Artikolo reverkita el diversaj artikoloj.

(1) Julio estas pseŭdonimo, lia vera persona nomo estis *Gyula*. Prononcu laŭ la hungara maniero **Bagi**, kaj ne kiel la fundamenta esperanta maniero Baĝy.

(2) Szeged (prononcu **Seged**) kuŝas, laŭ la nunaj landlimoj de Hungario, en la centra-suda parto de la lando, pli precize ĉe la kunfluejo de la riveroj *Tiso* kaj *Mureŝo* apud serba landlimo.

(3) Prononcu **Ĉe**.

(4) Tio ne signifas, ke la lingvo ne kapablas esti originala poezia lingvo, sed, ke ĝi, pro elvokotaj kialoj, ne atingis maturecon antaŭ la unua mondmilito.

(5) t.e. Zamenhof ne estis grandega verkisto.

(6) Vidu dekstre la poemon **Estas mi esperantisto**.

(7) Dum la unua mondmilito Hungario estis elemento de la Aŭstra-Hungara Imperio. La Imperio daŭris de la «Kompromiso» okazinta en 1867 ĝis la «Secesio» de Hungario, la 24an de oktobro 1918. La ĉiopotenca aŭstra Imperiestro estis ankaŭ reĝo de Hungario. Rusio, kiel ano de la Alianco almlitis Aŭstra-Hungarian Imperion. Baghy verŝajne estis kaptita frue.

(8) Senpage elŝutebla tie: http://donh.best.vwh.net/Esp/Esperanto/Kursoj/Verda_Koro/leciono_01.html

Vi trovos tie ligojn al senpagaj tekstoj de Baghy: http://donh.best.vwh.net/Esp/Esperanto/Literaturo/literaturo.originala.b.html#julio_baghy



☛ Kovril-paĝoj de Verdaj Donkiĥotoj,

Sur sanga tero kaj de Hura!

Komenciĝo de Viktimoj

U N U A Ĉ A P I T R O

Johano sidis ĉe la fenestro, rigardis en la senstelan nokton. Ekstere grincis la siberia frostoj.

Kvazaŭ nemezurebla morttuko kuŝis la dika neĝtavolo sur la tero. Interne, en la ĉambro, la aeron varmigis elspirajo de dek samsortanoj. Ili dormis.

La monotonan ronkadon nur kelkfoje interrompis subita ekkrio aŭ senkonscie parolataj ĝemfrazoj. La samsortanoj sonĝis. En la interna koridoro de la barako, de tempo al tempo, ĉhis la dormemaj paŝoj de la deĵoranta sub-oficiro. Ankaŭ li estis militkaptito, ĉar la rusa barakestro ne estis konfidinda persono. Eĉ por rusoj ne. La deĵoranto jen ekiras jen haltas por momento.

Malofte flustra interparolo filtriĝas tra la fermita pordo. Nur frazĉifonoj, sed ĉiam la samaj.

— Malvarme, tre malvarme!

— Jes! Malvarme. Tridekses gradoj...

— Nur? Dum la pasinta jaro en *irbit* ni travivis kvindekdu gradojn. Sciu, samlandano, kvindekdu gradojn! Tio ne estas infanaĵo, precipe, kiam oni devas elhaki arbaron, kiam nin mordas miloj da pedikoj.

— Jes, jes...

— Kiam ni povos reveni hejmen?

— Oni diras, ke la rusoj jam ne povos longe persisti...

— Mensogo! Mensogo, samlandano, mi diras al vi. Tio estas mensogo! Neniam ni iros hejmen. Neniam!

— Nu ankoraŭ iom da pacienco. Oni ne devas tuj perdi la esperon. Ni iros hejmen baldaŭ.

— Neniam ni iros hejmen! Neniam, mi diras al vi. Mi estas jam ĉi tie la trian jaron. Oni ĉiam diris, ke baldaŭ...

Baldaŭ, baldaŭ, kaj ĉiam baldaŭ. Neniam ni iros hejmen!

(la sekvo estos legebla en la libro mem disponebla en la libro-servo de la asocio)

Estas mi esperantisto⁽¹⁾

Verda stelo⁽²⁾ sur la brusto
iom palas pro la rusto.
Mi ne estas purigisto;
estas mi esperantisto⁽³⁾.

Kuŝas ie sub tegmento
«Netuŝebla Fundamento⁽⁴⁾».
Tuŝu ĝin nur la Mefisto;
estas mi esperantisto.

Polvkovrite sur bretaro
putras mia SAT-vortaro⁽⁵⁾.
Tedas min la vorto-listo;
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas
kaj gazeton ne abonas...
Librojn legu la verkisto;
estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:
«Bonan tagon! Ĝis revido!⁽⁶⁾»
Ĝi sufiĉas por ekzisto;
estas mi esperantisto.

Pionirojn mi kritikis,
la gvidantojn dorne pikas
kaj konspiras kun persisto;
estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas⁽⁷⁾,
sed nenion mi oferas.
Mi ne estas ja bankisto;
estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo
la movado, organizo⁽⁸⁾,
helpas mi nur per rezisto;
estas mi esperantisto.

Flugas per facila vento
el la buŝo Nova Sento⁽⁹⁾.
Ĝi sufiĉas por sofisto;
estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tombo mia
staros «rondo familia⁽⁹⁾»,
nekrologos ĵurnalisto:
estis li esperantisto.

⁽¹⁾ Tiu ĉi fama kaj ironia poemo de Baghy ne estas simpla poeziaĵo, ĉar ĝi enhavas multajn esperantistajn bildojn, kiujn nur esperantistoj povas entute kompreni. Per simplaj frazoj Baghy mallaŭdas la «bonan-taguloj» t.e. eternaj komencantoj, kiuj sin nomas esperantistoj, sed kiuj nur emas aliĝi E-folkloron sen aktiva agado. Mi substrekis Esperanto-konceptojn: ⁽²⁾ Simbolo de E,

⁽³⁾ Esperanto-parolanto kiu aktivigas por aŭ per la lingvo,

⁽⁴⁾ Gramatika teksto fiksanta la neŝanĝeblajn regulojn de la lingvo, ⁽⁵⁾ Plej grava tutesperanta vortaro, ⁽⁶⁾ Bazaj salut-vortoj en E, ⁽⁷⁾ La «Fina venko» de E: la esperata tago, kiam la lingvo estos akceptita tutmonde, kiel oficiala internacia lingvo, ⁽⁸⁾ E-movado kaj organizoj,

⁽⁹⁾ Aludoj al la versaĵoj de Zamenhof, «La Espero» (himno de E-movado).